

Violet's Merkbücher praktischen Wissens

P. Christaller
Esperanto



Stuttgart, Wilhelm Violet

F. Christiaaller. Esperanto

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

12 Boulevard du Théâtre, GENÈVE (Svisio)

.....

C E L O: Disvastigi la uzadon de la internacia help-lingvo Esperanto;

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

Krei internaciajn servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interecoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio;

Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.

SERVOJ: Ĉiu membro ricevas membrokarton, jarlibron kun la adresaro de la Delegitoj kaj multaj informoj pri la movado; li rajtas uzi la helpon de la Delegitoj difinita laŭ la statutoj.

ALIGŬ: La kotizo per **membro** estas 5 Frk. por **membro-abonanto** 12,50 Frk. svisa valoro. Rekomendinda estas la aliĝo kiel membro-abonanto kiu ricevas la gazeton «ESPERANTO» dum tuta jaro. **PRO LA KURZDIFERENCO SPECIALA FAVORA PREZO POR KURZSUFERANTAJ LANDOJ.**

Im Esperanto-Unterricht

haben sich bestens bewährt:

Dr. Uhlmanns Volkslehrbuch mit Schlüssel, sowie einem Übungsteil von **K. Steier**, M. 3.50.

Handwörterbuch Esperanto-Deutsch
u. Deutsch-Esperanto
(Neuausgabe des Schlaf'schen Wörterbuchs) mit einer vollständigen Wortbildungslehre von **K. Steier**, VIII und 271 Seiten, vornehm und dauerhaft geb. M. 11.—

Das goldene Buch des Esperanto
9. Auflage, mit der Vorrede zum „Fundamento“ und über 14 Tausend Wörtern (Esp.-Deutsch und Deutsch-Esp.), sowie Wortbildungs- und Sprachlehre. 336 Seiten, vornehm und dauerhaft geb. M. 7.50.

Im Druck befindet sich und im Winter erscheint, das seit Jahren vorbereitete

Ausführliche Wörterbuch

Esperanto-Deutsch, herausgegeben unter ständiger Mitarbeit von
Herrn Prof. P. Christaller-Stuttgart von **K. Steier**.
Preis etwa 18 M.

Einzigartig in bezug auf Reichhaltigkeit, Zuverlässigkeit, Unterscheidung der amtlichen und nicht amtlichen Wortstämme, mustergültig in drucktechnischer Hinsicht!

Illustrierte Preisliste, auch über meine Abzeichen, auf Wunsch postfrei. — Zu allen Preisen kommt z. Zt. ein Teuerungszuschlag von 20 %. — Gruppen und Propagandisten erhalten den üblichen Nachlass.

Esperanto-Verlag Rothermel, Gross-Tabarz
i. Thür.

La Struvelpetro



Beletaj rakontaj kaj komikaj bildoj
de
Dr. Heinrich Hoffmann

Esperanta traduko
de
J. D. Applebaum



Prezo: kartonita 18.— Mark
Por altvalutaj landoj altigo de 50%



Havebla por ĉiuj librejoj aŭ senpere de la eldonejo.
Postulu senpagan prospekton!

Literarische Anstalt Rütten & Loening
Frankfurt am Main

19
1-1

Esperanto

Die Grammatik von Dr. Samenhof
mit Erläuterungen

von Prof. P. Christaller

La gramatiko de D^{ro} Zamenhof
kun komentaro

de prof^{ro} P. Christaller



..... Stuttgart 1921

Verlag von Wilhelm Violet

Alle Rechte, insbesondere eine gleichartige Bearbeitung für andere Sprachen von der Verlagsbuchhandlung Wilhelm Violet vorbehalten.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Copyright by Wilhelm Violet, Stuttgart 1921.



512852

Druck von J. Fink, Hofbuchdruckerei Stuttgart.

D. 926/77
BIBLIOTEKA
Katedra Biblioteczna
Zobowiązany

**Dediĉita al sinjorino Klara Zamenhof
vidvino de l' aŭtoro de Esperanto**

Vorwort.

Man sollte sich nie vermessen, zu sagen, das oder das werde ich nie tun: gar oft wird man so geführt, dass man seine Voreiligkeit erkennen muss. So sagte ich früher: „eine Esperantogrammatik zu schreiben, fällt mir nicht ein, es gibt ohnedies schon genug“. Aber im Jahr 1909 schrieb ich eben doch eine, für die „Bibliothek des allgemeinen und praktischen Wissens“. Der Fall lag freilich dort so, dass die neue Grammatik den andern in diesem Sammelwerk erschienenen Grammatiken angepasst werden musste und also keine der vorhandenen Grammatiken verwendet werden konnte. Ich glaubte damals, endgiltig meinen Tribut auf diesem Gebiet entrichtet zu haben, aber — schon wieder habe ich „gesündigt“. Freilich liegt auch hier der Fall ganz besonders und es handelt sich nicht um eine Beeinträchtigung der Grammatiken für Esperanto: das Buch war den bekannten Merkbüchern des herausgebenden Verlags anzupassen, es ist zudem ausgesprochenemassen kein Lehrbuch für Anfänger, sondern ein Nachschlagebuch für alle, denen es mit dem gründlichen Erlernen der Sprache Ernst ist, zugleich ein Übungsbuch durch die beigegebene Esperanto-übersetzung, die freilich vielfach nicht wortgetreu ist und oft Ergänzungen des deutschen Textes bietet.

Als Grundlage für die Arbeit diente Dr. Samenpofs berühmte Urgrammatik mit ihren 16 Regeln ohne Ausnahme. Diese Regeln sind in nummerierten Abschnitten erläutert, wozu der wesentlichste Inhalt der „Lingvaj Respondoj“ mit verwendet wurde. Dass solche Erläuterungen nötig sind, liegt ja nicht an der Mangelhaftigkeit der Urgrammatik, sondern an der Verwickeltheit der Nationalsprachen, und Dr. Samenpof konnte mit Recht sagen: die ersten Esperantisten haben nur diese 16 Regeln gehabt und haben damit Mustergiltiges geschaffen. Möge meine Arbeit dazu dienen, die Freude an Esperanto und die Kenntnis dieser Sprache zu vertiefen.

Stuttgart, im Frühjahr 1921

P. Christaller.

Antaŭparolo.

Neniam oni diru: «tion aŭ tion neniam mi faros», ĉar facile la «potenca senkorpa mistero» nin gvidos tiel, ke ni faras «tion, kion ni ne volas». Pli frue kelkfoje mi diris: «mi tute ne skribos Esperanto-gramatikon, ĉar jam tro da ili ekzistas.» Tamen, en 1909 mi skribis gramatikon por «Bibliothek des allgemeinen und praktischen Wissens». La tiama afero estis tia, ke la nova gramatiko estis adaptota al la ceteraj gramatikoj aperintaj en tiu kolekto, oni do ne povis uzi unu el la jam ekzistantaj verkoj. Verkinte tiun gramatikon, mi kredis, ke mi certe ne plu ion faros en tiu teritorio, sed — jam denove mi «falas». Certe ankaŭ ĉi tie la afero estas tute aparta kaj ne temas pri konkuro kun aliaj gramatikoj por Esperanto: la libro nova estis adaptota al la konataj konsilaroj de l' eldonanta firmo; ĝi estas krome intence ne lernolibro por komencantoj, sed informejo por ĉiuj perfektigemaj jamaj esperantistoj, samtempe ekzerco-libro per la Esperant-igo aldonita, kiu cetere ne ĉiam estas laŭvorta, kaj kiu iafoje kompletigas la germanan tekston.

Bazo por mia laboro estas la fama pra-gramatiko de d-ro Zamenhof, kun ĝiaj dekseks reguloj senesceptaj. Tiuj reguloj estas komentitaj en nombritaj paragrafoj, kaj utiligita estas la plej esenca enhavo de la Zamenhofaj «Lingvaj Respondoj», aperintaj en «La Esperantisto» 1889—1893, en «La Revuo» 1906—1908 kaj en «Oficiala Gazeto» 1911—1912. La respondoj el la unua kaj tria nomita gazeto estas kolektitaj en kajero dudeka de la «Esperantista Dokumentaro». Tia komentario al la pra-gramatiko ne estas necesa pro mankhavenco de tiu gramatiko, sed pro la komplikeco de la naciaj lingvoj; d-ro Zamenhof prave povis diri: la unuaj esperantistoj nur posedis la dekseks regulojn kaj tamen povis skribi klasikan Esperanton. Mi deziras, ke mia laboro jena pli-profundigu la ĝojon pri Esperanto kaj la konon pri tiu lingvo.

Stutgarto, en printempo 1921

P. Christaller.

A. Alphabet. a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

1. Jeder Buchstabe ist auszusprechen.

Eŭropo, (s. unten 3. u. 6.), *lingvo* = *lin-gvo*, *anonkosto* = *anone-kosto*.

2.5 Vokale.

a, e, i, o, u, sie sind mittellang zu sprechen, auch wenn der Ton darauf liegt! *e* klingt, (wie im Polnischen), zwischen *e* und *ä*, *o* zwischen *a* und *o*, s. a. 6. Zwei Vokale neben einander sind immer zweisilbig zu sprechen: *troigi* = *tro-igi*.

3.2 Halbvokale, j, ŭ.

Man spricht *j* wie *i*, aber bei nachfolgendem oder vorangehendem Vokal, mit diesem als eine Silbe: *jupo* = *iu-po*; *urboj* = *ur-boi*; *ŭ* spricht man wie in «kaufen, Timotheus»: *miaŭi* = *mi-aŭ-i*, *ŭato*, *pseŭda*.

4.21 Konsonanten; die Dachbuchstaben ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ.

ĉ = tsch, wie in «Tschako», *ĝ* = dsch, wie in «Dschunke», *ĥ* = ch in «ach» (nicht wie in «licht»), *ĵ* (weich) wie in «Jour», *ŝ* (scharf) wie in «Asche». Die Töne für *ĝ* und *ĵ* muss man summen können, *ĉ*, *ŝ* dagegen klingen zischend. Weil *ĥ* nach *r* unschön klingt, wird es oft wie *k* gesprochen und geschrieben: *monarko*.

5.1 Sonstige Konsonanten, deren Aussprache der Deutsche besonders beachten soll.

c spricht man ausnahmslos wie *z*: Calvin würde Zalvin gelesen, in solchen Fällen ist *K* oder Anführungszeichen zu verwenden; dazu Fussnote mit Bezeichnung der Aussprache. *v* klingt immer wie *w*, *s* zischend wie *ss* in Nessel, *z* stimmhaft wie *s* in Esel.

6.1 Nationale Eigentümlichkeiten, die zu vermeiden sind.

Süddeutsche unterscheiden oft nicht genügend *b* und *p*, *d* und *t*, *g* und *k*, auch *sp* und *st* werden leicht zu *schp* und *scht*. Manche Deutsche sprechen *Eŭropo* wie im Deutschen oder aber wie im Französischen aus. Bei Sachsen kann man *ĥaroĥ* (*jaroj*), bei Westfalen *ĥuto* (*guto*) hören.

A. Alfabeto. a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

1. Ĉiu litero estu elparolata.

lipharoj = lip-haroj, packanto = pac-kanto, rashundo = ras-hundo.

2. 5 vokaloj, a, e, i, o, u.

Ĉiuj estu parolataj mez-longe, ankaŭ la akcentitaj! la ĝusta (pola) e sonas inter e kaj germana ä, la ĝusta o sonas inter a kaj o, kiel oni ĝin senkonscie parolas en *oi*, *Lloyd*. Du vokaloj, unu apud alia, ĉiam estas du silaboj: bala-i, po-eto.

3. 2 duonvokaloj, j, ŭ.

Oni prononcas j kiel i, sed unu-silabe kun la antaŭa aŭ sekvanta vokalo: «jaro» ne «i-aro», sed «ia-ro», bonaj = bonai. Same pri ŭ: «aŭ» kiel en *laufen*, «eŭ» kiel en *Thimotheus*: laŭdo, Eŭropo.

4. 21 konsonantoj, ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ.

Inter ili estas kvin supersignitaj, ĉapelitaj: ĉ = tsch en *Tscheche*, ĝ = dsch en *Dschungel*, ĥ = ch en *noch*, (ne kiel en *ich*), ĵ = sch (mola) en *Journal*, ŝ = sch (akra) kiel en *waschen*. La sonoj ĝ kaj j devas esti zumbelaj, dum ĉ kaj ŝ siblas. Ĉar ĥ post r sonas iom barbare, oni ĝin ofte anstataŭas per k.

5. Ceteraj konsonantoj, kies prononco germanoj devas atenti.

c estas ĉiam = z: «*Capri*» estus parolata *Zapri*, tial oni devas meti aŭ: Kapri, aŭ: «*Capri*», kun citiloj kaj suba rimarko pri la prononco; v ĉiam sonas kiel la germana w; litero s estas sibla, kiel en *Rosse*; z estas zumbela kiel en *Rose*.

6. Naciaj kutimoj evitotaj kaj eviteblaj.

Sudgermanoj ofte ne diferencigas b kaj p, d kaj t, g kaj k; ili inklinas diri «ŝpiri», «ŝtelo» anstataŭ «s-piri», «s-telo». Kelkaj germanoj lernis «Oiropo» aŭ «Öropo» anstataŭ «Eŭropo». Saksoj iafoje diras «ĥaroĥ» anstataŭ «jaroj», vestfaloj povas diri «ĥuto» anstataŭ «guto». De rusoj oni povas

Russen sagen zuweilen *mi havas* (*havas*), Franzosen betonen oft die letzte Silbe und sagen *anka-u*, Engländer endlich sagen leicht *lejveri* (*liveri*). Alle solche Fehler kommen von ungenügender Beachtung beim ersten Lernen. Von einem hervorragenden französischen Esperantisten hörte ich schon *alia* mit dem Ton auf der ersten Silbe sprechen. Manchmal, namentlich bei Italienern und Deutschen, kann man zweierlei e und o hören, diesen Brauch kann ich nicht tadeln, wird doch dadurch die Sprache noch wohlklingender. Jedenfalls hindern solche Dinge das Verstehen nicht und es ist oft sehr interessant, an denselben die Volkszugehörigkeit des einzelnen «Samideano» festzustellen; s. a. 121.

7. Namen der Buchstaben.

a, bo, co (zo), ço (tscho), do, e, fo, go, ĝo (dscho), ho, ĥo (cho), i, jo, ĵo (scho, weich), ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo (scho), to, u, ŭo, vo, zo (so, weich).

B. Regeln. 1. Der bestimmte Artikel ist *la*, für alle Geschlechter und Fälle, für die Einzahl und Mehrzahl. Einen unbestimmten Artikel gibt es nicht.

Anmerkung. Die Anwendung des Artikels ist wie in anderen Sprachen. Russen und Polen, denen der Artikel ungewohnt ist, können ihn anfangs ganz weglassen.

8. Anwendung des bestimmten Artikels.

Wenn man von bestimmten Personen oder Gegenständen spricht. Auch (wie im Deutschen) wenn man von einem ganzen Volke spricht: die Deutschen wohnen in der Mitte von Europa. Gilt ein Artikel für zwei oder mehr Wörter, so genügt in der Regel einmaliges Setzen desselben. Doch kann es Fälle geben, wo jedesmaliges Setzen klarer ist: *mi vidis la fraton kaj la sinjoron* = nicht irgend einen Herrn, sondern den, von dem man soeben sprach.

aŭdi «mi havas», anstataŭ «mi havas»; francoj ofte akcentas la lastan silabon: loĝas, kaj ankaŭ diras «almena-u»; angloj iafoje, laŭ sia nacia kutimo, diras «fejdela» anstataŭ «fidela». Ĉio tio devenas de ne sufiĉa zorgo en la komenco de la lernado; mi eĉ jam aŭdis de unu franca ĉefo en Esperantujo «alia» kun akcento sur la unua vokalo. Ĉe diversnaciaj esperantistoj oni trovas du diferencajn e kaj du o. Tio ne estas korekta, tamen mi ne povas ĝin mallaŭdi, ĉar per ĝi la lingvo fariĝas ankoraŭ pli belsona. Ĉiukaze tiaj malgrandaj diferencoj ne malhelpas la komprenon, kaj estas ofte tre interese, laŭ ili diveni la devenon de l' parolanto.

7. Nomo de la literoj.

a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

B. Reguloj. 1a. Artikolo ne definitiva ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rimarko. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo ĝin ne uzi.

8. Uzo de l' difina artikolo.

«La artikolo «la» estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj» (Z. Ekz-o 27). Kiam oni parolas pri tuta popolo oni prefere uzu la artikolon: La rusoj loĝas en Rusujo (Z.). Kiam artikolo rilatas al du aŭ pli vortoj, oni rajtas ĝin meti nur unufoje: li donis al li la pomon kaj panon; tamen iafoje la esprimo estas pli preciza, kiam oni metas ambaŭfoje la artikolon, akcentante per tio, ke ankaŭ la dua objekto estas konata, aŭ antaŭe priparolita.

9. ! Den Artikel nicht unnötig anwenden!

Leono estas besto nicht *la leono*, denn jeder Löwe ist ein Tier. Der deutsche Sprachbrauch ist launenhaft: man sagt «Herr und Frau X», aber «die Eheleute X», «Kaiser Karl (starb)» und «der Kaiser Karl», «Bremen (liegt . . .)», aber «die Stadt Bremen», oder «das schöne Bremen». Dr. Samenhof brauchte den bestimmten Artikel meist wie es im Deutschen üblich ist.

10. ! Gebrauch des Artikels in Esperanto, wo ihn das Deutsche nicht hat.

Oft findet man *la via (domo)* oder *via la (domo)*, letzteres meist in Gedichten, was man den Dichtern immerhin als Erleichterung zubilligen kann, damit der Rhythmus leichter eingehalten werden kann. Dr. Samenhof übersetzt oft «am (nützlich)-sten» mit *la plej (utile)*; s. a. 36.

11. Zweifelhafte Fälle.

Der Artikel muss nicht notwendig gesetzt werden, man braucht ihn am besten nur dann, wenn er aus logischen Gründen nötig erscheint. Weniger stört sein Fehlen als eine Anwendung am unrechten Platz; s. E. T. Ich las einmal eine Erzählung, die absichtlich ganz ohne Artikel abgefasst war, und nur in ganz wenigen Fällen kam mir das Fehlen eines solchen zum Bewusstsein.

12. Verstärkung des Artikels.

Der im Deutschen betonte Artikel wird mit *tiu* (oder *tio*) gegeben: der Hund gehört mir *tiu hundo apartenas al mi*; s. 69.

13. Apostrophierung

des Artikels s. Reg. 16; 171.

14. Unbestimmter Artikel.

Der unbestimmte Artikel im Deutschen wird nicht übersetzt, doch kann er, wenn er erwünscht erscheint, durch *iu* oder *certa* gegeben werden: *iu amiko petis de mi (iun) libron*. *Certa* hat in mehreren europäischen Sprachen, ausser dem Begriff «unzweifelhaft», auch die Bedeutung «ein gewisser». Manchmal fehlt auch im Deutschen ein Artikel, wo es sich um Teile einer Menge handelt, da wird in Esperanto oft *da* benützt: dazu braucht man Salz *bezonate estas da salo*.

9. ! Ne tro-uzu
«la»!

«Rozo estas floro», ne: «la rozo», ĉar oni ne celas apartan rozon; en germana lingvo uzo de l' difina artikolo ne estas sistema, regula, ni ekz-e diras: *Herr und Frau Klein*, sed ankaŭ *die Eheleute Klein*; *Schiller sagt*, kaj *der grosse Schiller sagt*; *Hamburg ist gross*, *die Stadt Hamburg ist gross*.

10. ! Uzo de «la»,
kiun la ger-
mana lingvo
ne havas.

Ofte oni renkontas «la mia (amiko)» aŭ «mia la (amiko)», la lastan precipe en poemoj; same «bela, juna la floreto» (Z.). Ambaŭ uzmanierojn oni evitu, tamen oni certe povas ilin permesi al poetoj. D-ro Z. tre ofte tradukas *am (schön)sten* per «la plej (bele)», v. 36.

11. Dubaj
okazoj.

«La uzado de la artikolo ne estas deviga; uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu.» Ekz-e: «venis tago, kiun mi atendis» tie pli bonstile estus: «venis la tago», sed kiam oni diras: «hodiaŭ estas la dimanĉo», tio «estas malagrabla por la oreloj de ĉiu bona esperantisto». (Z. Rev. I, 188).

12. Plifortigo
de l' artikolo.

Se oni deziras pli akcenti la montron, kiu estas enhavata en la artikolo, tiam oni uzu «tiu»: *der Mann hat es* tiu viro ĝin havas.

13. Apostrofado

de l' artikolo v. Reg. 16^{an}; §171.

14. Nedifina
artikolo.

La nedifina artikolo de la germana lingvo ĝenerale ne estas tradukata, tamen oni povas ankaŭ uzi «iu» aŭ «certa»: iu vidvino havis du filinojn. «Krom sia ĉefa senco, la vorto «certa» havas ankoraŭ la sencon de «iu» (iu difinita).» (Z. Resp. 26). Ifoje en la germana mankas ĉiu artikolo, precipe kiam temas pri partaĵo: *gib mir Brot* donu al mi panon.

Reg. 2. Das **Hauptwort** (Substantiv) bekommt immer die Endung *o*. Der Plural (Mehrzahl) bekommt die Endung *j*. Es gibt nur zwei Fälle: Nominativ (Werfall) und Akkusativ (Wenfall); der letztere entsteht aus dem Nominativ, indem die Endung *-n* hinzugefügt wird. Die übrigen Fälle werden vermittelt der Präpositionen ausgedrückt: der Genitiv durch *de* (von), der Dativ durch *al* (zu), der Ablativ durch *kun* (mit), oder andere, dem Sinn entsprechende Präpositionen.

15. Aussprache von oj.

Wie in «Heu» (*hoi*), aber unbetont; s. a. 2, 3. Eine besondere Anwendung von *-oj* s. 27.

16. Weglassen von -o

als Hauptwort-endung s. 131, 171.

17. Bildung von Hauptwörtern.

Jedes beliebige Esperanto-wort kann in ein Hauptwort verwandelt werden, sofern nur die damit ausgedrückte Idee denkbar ist: *grand-o*, *kur-o*, *tial-o*, *iom-o*, *per-o*. Statt *la grando* ist auch schon *l'o granda* vorgeschlagen worden.

18. Deklination.

Da eigentlich nur zwei Beugungsformen vorhanden sind, gibt die übliche Deklination folgende Formen: *avo(j)*, *de avo(j)*, *al avo(j)*, *avo(j)n*.

19. Genitiv, (Wessenfall).

Immer kann *de* nicht verwendet werden: «Gottesliebe» ist zweideutig, in Esperanto sagt man *amo de Dio* (Liebe von Gott) und *amo al Dio* (Liebe zu Gott).

20. Dativ, (Wemfall).

Nach Zeitwörtern, wie «wählen, ernennen, halten für» usw. braucht man im Deutschen den 3. oder 4. Fall, oft mit einer Präposition verbunden, in Esperanto dagegen den Nominativ ohne Präposition: *oni elektis lin (ke li estu) reĝo*; *mi juĝas lin (ke li estas) honesta*; s. a. 28.

21. Ablativ.

Dieser Kasus (im Lateinischen) wird im Deutschen und in Esperanto mit Präpositionen gegeben, in Esperanto steht dafür vielfach ein Adverb: mit Freude empfing er mich *ĝoj(igit)e li min akceptis*.

Reg. 2^a. La **substantivoj** havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo n. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per «de», la dativo per «al», la ablativo per «per» aŭ aliaj prepozicioj laŭ senco).

- | | |
|----------------------------|---|
| 15. Prononco de «oj». | Kiel «oi», sed unusilabe; v. 2, 3. Pri ne-kutima (en la germana) uzo de -oj v. 27. |
| 16. Forlaso de -o | ĉe fino de substantivo, v. Reg. 11 ^a kaj 16 ^a . |
| 17. Substantivigo laŭvola. | Ĉiun ajn vorton, ĉu ĝi estas radik-vorto aŭ ne, oni povas substantivigi, se la ideo estas ebla: radi-o, bel-o, hodiaŭ-o (aŭ hodi-o v. 100), tiom-o, kial-o, ve-o. Anstataŭ «la belo» oni ankaŭ proponis «l'o bela». |
| 18. Pri la deklino. | Ĉar fakte ekzistas nur du kazoj, la kutima deklino fariĝas jene: patro, de patro, al patro, patron. |
| 19. Genitivo. | Ne ĉiam ĝi estas tradukata per «de»: <i>Besuch der Stadt Bremen</i> vizito al (la) urbo Bremen'. «De» oni bezonas por la vizitanto: vizito de l' patro al Bremen. |
| 20. Dativo. | En la germana oni uzas ofte prepozicion kun dativo aŭ akuzativo post vortoj kiel elekti, fari, igi, juĝi, kredi, opinii, k. s. En Esperanto oni uzas nominativon sen prepozicio: <i>er ernannte ihn zum Führer</i> li nomis lin ĉefo. |
| 21. Ablativo. | Tiu kazo en la germana pleje estas esprimita per prepozicio kun dativo. Oni ĝin ofte povas traduki adverbe: <i>mit dem Automobil fahren</i> veturi aŭtomobile, <i>übersetzen durch ein Adverb</i> traduki adverbe. |

22. Anwendung des Akkusativs.

1. Als Ergänzung auf die Frage «wen oder was»: er liebt den Wein; ein Jäger schoss einen Hasen. 2. Bei Angaben betr. Preis, Mass, Gewicht, wobei man sich ja vielfach obige Frage denken kann: er zahlte fünf Mark. 3. Anstatt einer Präposition, namentlich wenn es sich handelt um die Richtung (s. 152), um eine Zeitangabe (s. 43, 45) oder die Dauer einer Handlung.

23. Doppelter Akkusativ ist zu vermeiden.

Legigi iun libron ist nicht klar, man sage: *igi iun legi libron*, oder *legigi libron al iu*. Statt *mi petas lin permeson*: *mi petas de li permeson*, oder *mi petas lin*, *permesi ke . . .*

24. Nutzen der Akkusativform.

In vielen Fällen gibt es kein Missverständnis, wenn die Akkusativform weggelassen wird, doch sind jene im Irrtum, die meinen, man könne auf diese Form ohne weiteres ganz verzichten. In den romanischen Sprachen, die ausser bei den Pronomen, keine besondere Akkusativform haben, müssen oft besondere Redewendungen gebraucht werden, deren Erlernen doch umständlicher ist, als das Setzen der Endung -n. Auch im Deutschen gibt es oft Unklarheit, weil die weiblichen und sächlichen Hauptwörter keine besondere Form für den 4. Fall haben: der Vater ruft den Sohn, die Mutter die Tochter. Beim Sprechen weiss man nicht sicher, ob der Vater alle drei ruft oder nur den Sohn; beim Schreiben kann man nur an der Kommastellung den richtigen Sinn erkennen.

25. Scheinbare Fehler.

Mi vidis lin sana, hier ist hinzu zu denken *ke li estas (sana)*, dagegen: *mi vidis lin sanan fali mahiva* ich sah ihn, den gesunden, leblos zu Boden fallen; s. a. 27, 28, 175.

26. Nominativ oder Akkusativ?

Man brauche den Akkusativ nur, wenn er wirklich nötig erscheint; ist man unklar, welcher Fall zu brauchen ist, dann wähle man unbedingt den Nominativ. Der Akkusativ ist nur dazu da, den

22. Apliko de akuzativo.

1. Por montri la suferanton de faro: li ŝatas vinon; ĉasisto pafis leporon. 2. Kiam temas pri prezo, kvanto, pezo aŭ io simila: li pagis kvin markojn; du metrojn longa; ĝi pezas tri funtojn; mi estis malsana ok tagojn. 3. Anstataŭ prepozicio: precipe kiam temas pri direkto, dato, daŭro de ago: la kvinan tagon (je la kvina tago), kvin minutojn li atendis (dum kvin minutoj); v. 43, 45, 152.

23. Duoblan akuzativon evitu!

«Mi pardonas lin lian kulpon» ne estas bona, oni uzu «al li lian kulpon» aŭ «lin pri lia kulpo». «lu(n)fojon vesperon» ne estas klare, oni metu «iufojon en vespero» aŭ «iufojon vespere, iufoje vesperon».

24. Utilo de akuzativo.

En multaj okazoj fuŝkompreno ne estas ebla, kiam oni forlasas la akuzativon, tamen ili eraras, kiuj opinias, ke oni povas tute eksigi tiun formon, pro tio, ke angloj, francoj, ktp. ĝin preskaŭ ne posedas (ĉe pronomoj ili ja ankaŭ ĝin uzas): oni ne pripensas, ke en tiuj lingvoj ekzistas anstataŭe paro!turnoj, kies ellerno estas pli komplika, ol meto de -n. La du frazojn «mi ŝatas lin pli ol mia frato; . . . pli ol mian fraton» oni devus — ne uzante akuzativon — diri per: mi ŝatas li pli ol mia frato li ŝatas; . . . pli ol mi ŝatas mia frato. Krome, sen akuzativo la libera fraz-konstruo estas limigita.

25. Ŝajnaj eraroj.

«Oni nomis lin ĉefo» tie ni devas pense aldoni: ke li estu (ĉefo): kontraŭe: oni insultis lin, prezidanton, pro . . .; mi vidis lin (ke li estis) kuranta; mi vidis lin kurantan = dum li kuris; v. 27, 28, 175.

26. Akuzativo aŭ nomativo.

«Uzu la akuzativon ĉiam nur en tiaj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi nescias, ĉu oni devas

Sinn einer Rede klarer zu machen, es stört viel mehr, wenn er zu oft, als wenn er zu wenig angewandt wird. (Z. 1890). *Petro batis Paŭlon anstataŭ (bati) Vilhelmon.* Hier ist das *-n* bei *Vilhelmon* unerlässlich, namentlich, wenn *bati* weggelassen wird.

Reg. 3. Das **Eigenschaftswort** (Adjektiv) endet immer auf *a*. Deklination wie beim Substantiv. Der Komparativ wird mit Hilfe des Wortes *pli* (mehr), der Superlativ durch *plej* (am meisten) gebildet. Das Wort «als» heisst *ol*; z. B.: *pli blanka ol neĝo* weisser als Schnee.

**27. ! Das beige-
setzte Ad-
jektiv**

richtet sich betr. Akkusativ und Mehrzahl nach seinem Hauptwort. Wenn es sich auf zwei in der Einzahl stehende Hauptwörter bezieht, kommt es in die Mehrzahl: *la belaj libro kaj bildo* (dies zeigt an, dass beide schön sind. Andererseits kann auch das Hauptwort (entgegen dem deutschen Brauch) in der Mehrzahl stehen und die Eigenschaftswörter in der Einzahl: *inter la alta kaj malalta montoj staras domo.*

**28. Das prädi-
kative (in
der Aussage
stehende)
Adjektiv**

richtet sich in der Mehrzahl nach seinem Hauptwort, aber nicht im Akkusativ: ich halte sie für ehrlich *mi kredas ilin (estantaj oder ke ili estas) honestaj*; ich fand den Apfel gut *mi trovis la pomon bona (pomon bonan* heisst «den guten Apfel»).

**29. In Beziehung
zu einem In-
finitiv**

bekommt die Eigenschaft die adverbiale Form *sin ebrügi ne estas prudente*. Zuweilen findet man auch die *-a* form, dann muss man sich eben ein ausgelassenes Hauptwort zudenken: «*amase stari sur la strato estas malpermesita (faro)*». (Z. Dua libro, 24); s. 55, 175.

**30. Stellung
des Adjek-
tivs**

ist beliebig, im allgemeinen vor dem Hauptwort; ist das Adjektiv lang, oder gehören mehrere zusammen, so stehen sie besser nach.

uzi la akuzativon aŭ la nominativon — uzu ĉiam la nominativon. La akuzativo estas enkondukita nur pro neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara.» (Z. Resp. 21).
Mi vidis lin, ne vin — tie almenaŭ la dua akuzativo estas necesa.

Reg. 3a. La adjektivo finiĝas per a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto «pli», la superlativo per «plej»; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion «ol».

27. ! Adjektivo apudmetita

akordiĝas laŭ kazo kaj nombro kun sia substantivo. Se ĝi rilatas al du aŭ pli substantivoj, ĝi ricevas multenombran formon: mi trovis mineralon kaj planton maloftajn (ambaŭ estas maloftaj). Aliparte oni foje uzas -oj, kie en la germana estas ununombro: *Die deutsche, dänische, holländische und schwedische Sprache gehören zu den germanischen* la lingvoj germana, dana, holanda kaj sveda apartenas al la ĝermanaj.

28. Adjektivo predikateca

akordiĝas kun sia substantivo nur laŭ nombro, ne laŭ kazo: mi juĝas la vinon bongusta, (laŭ mia juĝo ĝi estas bongusta); mi juĝas la vinon bongustan, (oni scias aŭ diras, ke la vino estas bongusta, kaj nun mi diras mian juĝon).

29. Rilato al infinitivo.

Kiam eco rilatas al infinitivo, aŭ tuta frazo, tiam la eca vorto ricevas formon adverban: resti kun leono estas danĝere (Ekz-o 7, 5). lafoje oni trovas ankaŭ finaĵon -a, en tia kazo oni pense aldonu substantivon ellasitan: resti kun leono estas danĝera (afero); v. 55, 175.

30. Loko de 1^a adjektivo

estas laŭvola, ĝenerale antaŭ ĝia substantivo, sed se la adjektivo estas longa, aŭ se pluraj estas kune, tiam pli bone oni postmetu ĝin.

31. Einfacher Vergleich
wird gegeben durch: *tiel (granda) kiel (li)*; *same . . . kiel*; (*same . . . ol* ist nicht gut): *tia(n) . . . kia(n)*; *tiom (da) . . . kiom*;
32. Gegensätzlicher Vergleich.
alia ol: niemand anderes als du, *neniu (alia) ol vi*; ich habe lieber eine Birne als einen Apfel, *mi preferas piron (pli) ol pomon*. *Ju pli . . . des pli*; *ju malpli . . . des (mal)pli*; *malŝama* (oder *malŝame*) . . . *ol*.
33. Steigerung (Komparativ)
pli . . . ol, malpli . . . ol. Manchmal braucht man im Deutschen den Superlativ, wo in Esperanto, sinngemäss, der Komparativ stehen muss: er ist der grösste von beiden *li estas (la) pli granda*.
34. Vergleichender Superlativ.
plej . . . (el), malplej . . . (el): das war der Schönste von allen *tiu estis la plej bela el ili*; *la malplej granda el la tri*; s. 156.
35. Absoluter Superlativ.
Treege, plej, kiel eble plej: er hatte den günstigsten Platz *li havis plej oportunan lokon*.
36. *La plej bone*.
Diese Form brauchte Dr. Samenhof häufig beim adverbialen Superlativ: *li la plej bone vidis*; s. a. 10.
37. ! Falscher Komparativ im Deutschen.
Eine grössere Stadt *iom granda urbo*; ein besseres Theater *sufiĉe bona teatro*.
38. -a und -anta.
Das gewöhnliche Adjektiv bezeichnet eine dauernde Eigenschaft, das partizipiale eine vorübergehende: *blanka rozo, floranta rozo*.
39. Zu häufige -aj und -oj
wird der Sprachkünstler gerne vermeiden (obgleich ein Professor für alte Sprachen diese, ihn an das Griechische erinnernden Laute ungemain angenehm fand). Hier einige Vorschläge: *ili kiuj* (statt *ĉiuj tiuj, kiuj*); *ĉiu homo kiu* (statt *ĉiuj homoj, kiuj*); *la pac-amantoj (la homoj, kiuj amas pacon)*; *ti-kiuj (tiuj, kiuj)*; *seg-, bor- kaj tranĉiloj (segiloj, boriloj kaj tranĉiloj)*.

31. Egala komparo. Por ĝi oni uzas: tiel (granda) kiel (ŝi); tia(n) . . . kia(n); tiom (da) . . . kiom; same . . . kiel; («same . . . ol» ne estas bona).
32. Malegala komparo. alia (propono) ol (via); neniu (alia) ol (vi); ili preferis panon (pli) ol kukon; ju pli (vi kantos), des pli (bone estas); ju malpli . . . des (mal) pli; malsama (aŭ malsame) . . . ol.
33. Komparativo. (mal)pli . . . ol. En la germana oni iafoje uzas superlativon, kie temas fakte pri komparativo: *Karl ist der älteste von beiden* Karlo estas la pli aĝa (el ambaŭ).
34. Superlativo kompara. (mal)plej . . . el: li elektis la plej grandan el la fruktoj *er hat die grösste Frucht (von allen) genommen*; v. 156.
35. Superlativo absoluta. Por ĝi oni uzas: tre(ege), (la) plej, kiel eble plej: venu al ni kiel eble plej baldaŭ *komme möglichst bald zu uns*.
36. La plej bone. Ĉe adverba superlativo d-ro Z. ofte uzis la artikolon: «mi sendos mian ministron, kiu la plej bone vidos» (Kr. 20); v. 10.
37. ! Ne korekta komparativo en la germana. *In einer besseren Familie* en ŝatinda familio, *eine grössere Anzahl Häuser* iom granda aro da domoj.
38. -a kaj -anta. Eca adjektivo enhavas en si la ideon de ĉiama eco; participo, t. e. adjektivo, devenanta de verbo, montras econ nedaŭran: granda domo; fluanta akvo.
39. Tro oftaj -aj, -oj, -uj. Bona literaturisto ilin evitas (kvankam iu prof-ro por antikvaj lingvoj ilin juĝis tre agrablaj, ĉar ili memorigas lin je la greka lingvo, multe ŝatata de li). Jen kelkaj proponoj por evito ilin: ti-kiuj anstataŭ: tiuj, kiuj); grupanaro (ĉiuj grupanoj); pom-, pir-kaj prunoj (pomoj, piroj kaj prunoj).

Reg. 4. Die Grund-Zahlwörter (undeklinierbar) sind folgende: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). Zehner und Hunderter werden durch einfache Anreihung der Zahlwörter gebildet; z. B. *kvin-cent tri-dek tri* — 533. Ordnungszahlwörter entstehen, indem sie die Endung des Adjektivs annehmen; z. B.: *kvara* vierter. Vervielfältigungszahlwörter — durch Einschlebung des Suffixes *obl*; z. B.: *triobla* dreifach. Bruchzahlwörter — durch *on*; z. B.: *kvarono* ein Viertel. Sammelzahlwörter — durch *op*; z. B.: *duope* — selbender. Distributive Zahlwörter — durch das Wort *po*; z. B.: *po kvin* — zu fünf. Ausserdem gibt es Substantiv- und Adverbialzahlwörter: z. B. *cento* das Hundert, *due* zweitens.

40. Unu

sollte nur als Zahlwort gebraucht werden. Es kann auch als Fürwort gebraucht werden, dann meist in Verbindung mit *alia*, in diesem Fall kann es die Endungen *-n*, *-j*, *-jn* bekommen: den einen sah ich, den andern nicht *la unun mi vidis*, *la alian ne*. Dieser Gebrauch mag die Ursache sein, dass *unu* nicht wie die übrigen Grundzahlen einsilbig ist. Diese zweite Bedeutung des Wortes lässt sich vermeiden, wenn man dafür *tiu*, *iu* und dergl. setzt: *(t)iu mi vidis*, *la alian ne*; *kelkaj restis*, *aliaj foriris*.

41. Ambaŭ

bedeutet «alle zwei» *la ambaŭ* ist nicht zu empfehlen, auch im Sinne von «sowohl» soll das Wort nicht verwendet werden: also nicht: *mi loĝas en Londono ambaŭ en somero kaj en vintro*, sondern *kiel en . . .*, *tiel ankaŭ . . .*, oder *ne nur en . . .*, *sed ankaŭ en . . .* (Z).

42. Zahlwörter
mit -o

bekommen ein folgendes *da*: 12 Äpfel *dekdu pomoj*; ein Dutzend Äpfel *dekduo da pomoj*; *milionoj da markoj*.

43. Datum-
angaben

Den 2. Mai 1921 (*la*) *duan (tagon) de Majo en (la jaro) mil naŭ-cent du-dek unua* oder *2an en Majo 1921a*, oder *je l' dua de Majo. Duan*

Reg. 4a. La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj — la sufikson «obl», por la nombraj — «on», por la kolektaj — «op», por la disdividaj — la vorton «po». Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.

40. Unu

Oni ĝin uzu kiel eble nur numerale. Tamen oni povas uzi ĝin ankaŭ pronome, kaj tiam precipe kun la vorto «alia». Tiukaze ĝi povas ricevi la deklinajn finaĵojn: la unun mi trovis, la alian ne; unuj venis, aliaj foriris. (Tiu uzeblo eble estis la kaŭzo, ke «unu» ne estas unusilaba kiel la aliaj numeraloj fundamentaj). Oni povas eviti tiun pronoman uzadon, se oni uzas anstataŭe «tiu, iuj», k. s.: tiuj venis, tiuj foriris; iuj (kelkaj, pluraj) venis, aliaj foriris.

41. Ambaŭ

Ĝi «signifas «ĉiuj du», t. e. ĝi estas uzata anstataŭ «ĉiuj», kiam ni parolas nur pri du personoj aŭ objektoj». Oni ne diru: ambaŭ en somero kaj en vintro, oni diru: ne nur en somero, sed ankaŭ . . . «Kvankam mi ofte uzis la formon «la ambaŭ», tamen mi opinias nun, ke pli logika estas uzi la vorton «ambaŭ» sen artikolo.» (Z. Resp. 28).

42. Numeraloj kun -o

Ilin sekvas «da»: cent personoj; cento da personoj; mil markoj; multajn milojn da ŝafoj.

43. Esprimoj pri dato

Kiun daton ni havas? Estas la dua (tago) de Aprilo; la trian de Aprilo, aŭ: je la tria de Aprilo; oni ne rajtas diri li ĝisvivis la dudekan Majon, kiam temas pri dudeka tago de Majo, ĉar «dudeka Majo» estas Majo en la dudeka jaro.

- Majon* ist nicht klar (ein Maikäfer, der in einem zweiten Jahr kommt, erlebt *duan Majon*).
44. Zeitangaben
Wieviel Uhr ist es? *kioma horo estas?* Es ist zwei Uhr *estas la dua (horo)*; um 12 Uhr 30 *je dekduo kaj duono, je l' dekdua (horo) kaj duona, je dekduo (kaj) tridek (minutoj), je duono de la (oder antaŭ la) unua, je duono post tagmexo* oder *noktomexo*. Nach $\frac{3}{4}$ 6 Uhr *post tri kvaronoj de la sesa*.
45. Altersangaben
Wie alt bist du? *kiun aĝon vi havas?* ich bin zehn Jahre alt, ich bin zehnjährig *mi havas dek jarojn, mi estas dekjar(aĝ)a*.
46. Bruchzahlen
 $20 \frac{4}{5}$ *dudek kaj kvar kvinonoj*, hier ist *kaj* durchaus nötig, um ein Missverständnis zu vermeiden. *Du kaj duonan horo(j)n mi atendis*.
47. -obla, -foja
Duobla peto zweifache Bitte, (Bitte von zwei Seiten, oder von einer Seite, aber zwei Bitten zugleich; *dufoja peto* zweimalige Bitte, (2 mal hinter einander).
- 48 Beim Rechnen
 $2 + 3 = 5$ *du kaj (oder al, plus) tri estas (oder faras) kvin*; $2\frac{1}{2} + 3,5 = 6$ *du kaj duono al (oder plus) tri, komo kvin estas ses*; $6 - 4 = 2$ *ses minus kvar (oder ses for kvar, kvar de ses) jaras du*; $4 : 2 = 2$ *du en kvar estas dufoje*; $2 \times 4 = 8$ *duoble kvar faras ok*.
49. je = po!
Man kann nicht sagen *je 80 centimoj po funto* oder *30 mejlojn po horo*, sondern es muss heißen *po 80 centimoj por (ĉiu) funto, po 30 mejloj en horo*. (Z. Rev. II, 587); s. a. 163.
50. Unbestimmte Zahlwörter
Alia, cetera, io, iom(ete) (da), kelka, kelke (da), kiom (da), (mal)multa, multe (da), Forts. im E. T.
51. «Von» nach Zahlwörtern
wird meistens mit *el* übersetzt: *du el ili, kelkaj el la amikoj*. Häufig wird auch folgende Wendung gebraucht: *unu mia amiko, kelkaj niaj anoj, du iliaj bovoj (du el iliaj)*; s. a. 34, 69, 156.

44. **Esprimoj pri horlog-tempo**

Kioman horon ni havas? (ni havas) la duan; estas la dua (horo); $\frac{1}{4}3$ dua kaj kvarono, aŭ kvarono de la tria; $\frac{1}{2}3$ dua kaj duono; duono de la tria; $\frac{3}{4}3$ du kaj tri kvaronoj, aŭ (unu) kvarono antaŭ la tria, aŭ dua (kaj) kvardek kvin (minutoj); la trajno foriris akurate je 1' kvara kvindek.

45. **Diroj pri aĝo**

Kiun aĝon vi havas? kiom da jaroj vi havas? Mi havaŝ dek jarojn; mi estas dekjar(aĝ)a.

46. **Nombronroj**

$30\frac{3}{4}$ tridek kaj tri kvaronoj; ĉi tie la «kaj» estas necesa, por eviti fuŝkomprenon. Mi atendis du horojn kaj duonan.

47. **-obla, -foja**

Du-obla peto estas peto de du flankoj, aŭ de unu flanko du petoj samtempe; du-foja peto estas peto dufoje dirita.

48. **Kalkulado**

$23 + 8 = 31$ dudek tri kaj (aŭ plus) ok estas (aŭ faras) tridek unu; $36 - 4 = 32$ tridek ses minus (aŭ for) kvar faras tridek du; $5 \times 20 = 100$ kvinoble dudek estas cent; $30 : 2 = 15$ tridek dividite per du estas dek kvin aŭ: du en tridek estas dekkvin-foje.

49. **je (germana) = po**

«Oni ne povas diri: je 80 centimoj po funto, aŭ 30 mejlojn po horo, sed oni devas diri: po 80 centimoj por (ĉiu) funto, po 30 mejloj en horo.» (Z. Rev. II, 587) v. 163.

50. **Nedifnraj numeraloj**

(daŭrigo de la listo en G. P.) malpli (da), nenio (el), neniom (da), neniŭ (el), pli (da), tiom (da); v. 163, 164.

51. **Von post numeraloj**

Pleje oni ĝin tradukas per «el»: du el ni; pluraj el la ĉeestintoj. Ofte oni ankaŭ uzas jenajn formojn: unu via libro; multaj liaj leteroj; G. P., same 34, 69, 156.

Reg. 5. Die persönlichen Fürwörter sind: *mi* (ich), *vi* (du, ihr), *li* (er), *ši* (sie), *ĝi* (es; von Tieren oder Sachen), *si* (sich), *ni* (wir), *ili* (sie, Mehrzahl), *oni* (man). Possessive Pronomina werden durch die Hinzufügung der Endung des Adjektivs gebildet. Die Pronomina werden gleich den Substantiven dekliniert z. B.: *mi-a* mein, *mi-n* mich.

52. Ci = du

In obiger Grammatik-regel nicht enthalten, aber im «Universala Vortaro» aufgeführt. Es wurde der Vollständigkeit wegen aufgenommen, aber offenbar von Dr. Samenhof nicht geschätzt, selbst in seinem berühmten «Kongressgebet» ist *vi* gebraucht.

53. Vi, vi

Kleinschreibung in allen Fällen ist zu empfehlen (Z).

54. li, ŝi, ĝi

Die beiden ersten sind nur für Personen und allenfalls für Tiere anzuwenden, wenn deren Geschlecht bekannt ist. Sonst wird *ĝi* benützt, was aber nicht (z. B. bei einem Kinde) als verächtlich angesehen werden darf. Doch wird man auch bei *homo*, *ulo* lieber *li* anwenden, bei *persono* darf keinesfalls *ŝi* gebraucht werden.

55. «es»

wenn «es» sich auf vorher Besprochenes bezieht: *ĝi* oder *tio* z. B. *tio estas vi*, *Ivan'* oder *ĝi estas vi*, *Ivan'* (Z.); wenn es sich auf einen Infinitiv bezieht, wird es nicht übersetzt und das Adjektiv wird Adverb z. B. es ist leicht, ihn zu betrügen *estas facile*, *trompi lin* s. 29; das unpersönliche «es» wird nicht übersetzt: es donnert *tondras*.

56. ! Nicht zu sparsam mit den Fürwörtern!

Weil die Zeitwort-formen unverändert bleiben, muss man der Klarheit wegen, häufiger als im Deutschen die Fürwörter anwenden: *donu al mi*, *mi petas*, *la panon* (also nicht nur *petas*), oder besser: *(bon)volu doni al mi la panon!*

57. si

soll nur für die dritte Person verwendet werden, nicht, wie manche Slaven tun, für die erste

ĉ (tŝ), ĝ (dĵ), c (ts). Solche Zusammenziehung in ein Zeichen ist günstig, um das gewohnte Wortbild zu wahren: ĝardeno (statt dĵardeno) cent (statt tsent). Mit gleichem Recht dürfte aber auch x erscheinen.

120. Jeder Laut
hat immer
das gleiche
Zeichen

Nicht wie im Deutschen i = i, ie, ih, ieh, (ü, y); f = f, v, ph.

121. Ungenaue
Aus-
sprache

Manchmal kommen zwei Konsonanten zusammen, die nebeneinander nicht ohne besondere Mühe richtig gesprochen werden können: *sed precipe* wird *sed brecipe* oder *set precipe*, usw. Da diese Schwierigkeit bei allen europäischen Völkern besteht, so hat die kleine Ungenauigkeit keinerlei Missverständnis zur Folge.

122. Pause bei
langen
Wörtern

Auch bei Esperanto muss sich die Zunge den neuen Sprachformen anpassen. Man tut gut, beim Lernen und Lesen das Gedruckte zu sprechen, ausserdem sollte man, namentlich bei zusammengesetzten Wörtern gewisse Wortteile durch eine kleine Sprech-pause auseinander halten, besonders ist dies nützlich bei *mal-*, *-iĝinta*, und dergl.: *mal-varmumis*, *malamik-iĝinta*. Auch bei schriftlichem Text ist dieses Verfahren für ein leichteres Verstehen zu empfehlen.

123. Doppel-
konsonan-
ten

Ausser bei Eigennamen sollte man in Esperanto niemals Doppelkonsonanten aufkommen lassen: *Ŝiller*, *Buddo* (besser *Budho*), *Finnlando*, sind annehmbar, aber bei Stuttgart genügt *Stutgarto*.

oni ne bone povas anstataŭi «vidi» per «vido» (por vido lin). Kaj «ĉiu prepozicio, laŭ sia logika esenco, povas esti uzata nur antaŭ substantivo» (Z. Rev. II. 298, 437).

Reg. 9a. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

118. Neniaj mutaj literoj

Ne ekzistas en Esperanto sonoj, por kiuj oni bezonas du aŭ pli literojn (en la franca: ch, -ent, on, eau, kaj multaj aliaj).

119. Literoj kun du sonoj

ĉ, ĝ, ĉ, ili sonas kiel tŝ, dj, ts. Tia kunigo de sonoj en unu literon estas taŭga, por konservi la kutiman vort-aspekton: ĝentila (anstataŭ ĵentila, dĵentila), Cicero (anstataŭ Tsitsero). Tamen samrajte oni uzus x anstataŭ ks, kz.

120. Ĉiu sono ĉiam havas la saman literon

Ne kiel en la franca: en-, -ent, (t)emps, -an, -ant, ktp. (kiujn oni prononcas sammaniere), ne parolante pri la angla.

121. Ne preciza prononco

lafoje du konsonantoj kuniĝas, kiujn oni ne povas elparoli sen aparta peno: «ekzameno» fariĝas «eksameno» aŭ «egzameno». Tiu malprecizaĵo ekzistante ĉe eble ĉiuj eŭropaj popoloj, ne estas grava pri bona kompreno (Sint. 18).

122. Paŭzo ĉe longaj vortoj

Ankaŭ ĉe Esperanto oni devas kutimigi la langon al la nova lingvaĵo. Estas konsilinde, paroli voĉe dum lernado, legado; krome, ĉe kunmetitaj vortoj, oni disigu, iom paŭzante, afiksojn «mal-, -iĝinto» k. a. de la radik-vortoj: mal-amikiĝinta aŭ malamik-iĝinta. Ankaŭ en presitaj tekstoj foje streketoj inter vort-partoj estas helpaj por tuja kompreno: molkora = molk-ora?! ha! mol-kora

123. Duoblaj konsonantoj

Krom ĉe propraj nomoj oni tute ne enirigu duoblajn konsonantojn: «villo» por «kampodomo» ne estas bona, oni uzu «vila'», aŭ

Auch *Finlando* würde kein Missverständnis geben, aber *fino* für «Finne» geht nicht.

124. Majuskeln

Grosse Anfangsbuchstaben benütze man nur bei Satzanfängen und bei Eigennamen, bei letzteren mag jedes dazu gehörige Wort eine Majuskel bekommen: «Esperanto Triumfonta». Auch bei Gedichten sollte man abkommen von dem ziemlich sinnlosen Brauch der Majuskel bei jedem Zeilenanfang (diese Mode hat einige Berechtigung, wenn der Text fortlaufend gesetzt ist, dadurch wird der Anfang eines neuen Verses kenntlich gemacht, freilich gäbe es hierfür bessere Mittel); s. a. 53.

125. Wort-absetzen

Dr. S. fordert dafür keine Regel, würde sogar *aparteni-s* annehmen. (Resp. 15). Man trenne nach den Wortteilen, bei längeren Stammwörtern in der sonst üblichen Weise: *mal-kompren-ado*, *kom-preni*.

Reg. 10. Der Akzent fällt immer auf die vorletzte Silbe.

126. Akzentbezeichnung

gibt es in Esperanto nicht, in Grammatiken wird der Akzent bei den Anfangsübungen am besten durch Fettdruck hervorgehoben.

127. Apostrophierung

ändert an der Betonung nichts, auch das Mehrzahl *-j* nicht: *familio*, *familj*, *patroj*.

128. Bei Wortzusammensetzungen

ist es oft von Wert, auch beim Vorderwort die Betonung einzuhalten: *pie-diranto* Fussgänger und *pie-diranto* ein Fromm-sprechender; im allgemeinen ist das Einhalten solcher Nebenakzente, beispielsweise in Gedichten, nicht durchaus nötig.

129. Silbenlänge

Alle Silben werden mittellang gesprochen, auch wenn der Ton darauf liegt; s. 2.

Reg. 11. Zusammengesetzte Wörter entstehen durch einfache Anreihung der Wörter, indem man sie durch hochstehende Striche trennt. (Selbstverständlich nur für Anfänger).

- «vilao»; por *brutto*, *netto*, *moll*, oni havas: kuntare, nete, mol.
124. Majuskloj («grandaj» literoj) | llin oni uzu nur ĉe komenco de frazoj, kaj ĉe propraj nomoj, ĉe tiuj lastaj oni ja povas doni al ĉiu vorto, apartenanta al titolo, majusklon: «Germana Esperanto-Asocio». Ankaŭ ĉe poemoj oni forlasu la iom sensencan kutimon, meti majusklon ĉe ĉiu vers-komenco (tiu kutimo ja estas iom rajta, kiam oni skribas ŝtrofon, ne metante ĉiun verson sur apartan linion, tamen oni povus trovi pli taŭgan rimedon, por konigi vers-komencon); v. 53.
125. Disigo de vorto en du liniojn | D-ro Z. ne starigis regulon pri tio, li eĉ akceptus disigon tian: aparteni-s. Konsilinde estas disigo laŭ vort-partoj, ĉe iom longaj radikvortoj oni disigu laŭ kutima metodo: dis-ig-eb-la, in-stink-to.

Reg. 10a. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

126. Akcent-montro | En la komencaj ekzercaĵoj de gramatiko oni montru la akcenton plej bone per grasa litero.
127. Apostrof-ado | ne ŝanĝas la akcentatan silabon, same ne la «oj» de pluralo.
128. Akcento en kunmetitaj vortoj | lafoje estas necese, ke oni bone atentu la akcenton ĝustan de la unua vorto: bufesalti, bufed-istino; (ĝenerale ja ne estas grava, kiam oni ŝanĝas tiajn krom-akcentojn, ekzemple pro ritmo en poemo).
129. Longo de l' silaboj | Ĉiujn silabojn oni parolu mez-longe, ankaŭ la akcentitajn; v. 2.

Reg. 11a. Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

Das Grundwort kommt zuletzt. Grammatische Endungen werden als selbständige Wörter betrachtet; z. B. *vapor* 'ŝip'o (Dampfschiff) besteht aus *vapor* = Dampf, *ŝip* = Schiff, und *o* = Endung des Substantivs.

- 130. Arten der Wortzusammensetzung**
- Marmor-tablo* = *tablo el marmoro* oder *marmora tablo*. Die erste Art wird wie im Deutschen angewendet, oft liest man *centjaro*, *miljaro*; aber *jarcento*, *jarmilo* ist logisch: ein Hundert von Jahren, nicht: ein Jahr mit der Zahl hundert.
- 131. Grammatische Endungen**
- Des Wohlklangs wegen kann man dem Vorderwort die grammatische Endung lassen: *ovo-forma*; manchmal erfordert die Klarheit notwendig jene Endung: *unua-klasa* erstklassig; *unu-klasa* einklassig. Doch wird im allgemeinen auch das *-a* und *-e* von Adjektiv und Aderb weglassen: *bel-aspekta*, *bon-edukita*, *long(a)tempe*.
- 132. Besondere Formen**
- Die Herren Reisenden (*la*) *sinjoroj-vojaĝantoj*, Sattler und Tapezier *selisto-tapezisto*.
- 133. Meide zu lange Wörter**
- «In Esperanto sind die Wörter meistens natürlicher und wohlklingender, wenn man sie nicht zusammensetzt, sondern getrennt anwendet.»
- 134. Prinzip der Notwendigkeit und des Genügens**
- Dr. de Saussure hat dieses Gesetz aufgestellt, wonach man jeden für das Verständnis durchaus nötigen Wortteil geben muss, aber jeden überflüssigen weglassen soll. (Wie man auch im Deutschen oft nur z. B. «Zug» sagt, weil der *Mitttext* Klarheit gibt; in gewissen Fällen muss aber Luft- oder Eisenbahn- *Gesichts-zug* und dergl. gesagt werden; s. a. 142.
- 135. Freizügigkeit in der Wortbildung**
- Die Möglichkeit ist noch viel grösser als im Deutschen, wo man lacht über «zu-ig und «hin-ig» der Kinder, oder über «geizhalsen» und dergl. bis es einem Dichter gelingt, das Wort in Umlauf zu bringen. In Esperanto sind alle vier Wortgebiete benützlich: 1) die Wurzelwörter

130. Specoj de vort-kunmeto
- Ĝarden-pordo = ĝardena pordo = pordo de ĝardeno. La unua maniero estas germana kaj angla, la tria estas franca. Ifoje oni ne ĝuste kunmetas la vortojn: ekz-e «falakvo» estas prave uzata en: falakvo funkciigas turbinon. Sed en kutimaj okazoj oni diru «akvofalo».
131. Gramatika finaĵo ĉe la antaŭa vorto
- Ĝenerale oni ne metas gramatikan finaĵon al la antaŭa vorto, sed ifoje ĝi pro belsono estas oportuna aŭ, pro klareco, necesa: fingro-ringo, fingro-ingo, du-ranga, dua-ranga. Ĝenerale oni ne metas la adjektivan aŭ adverban finaĵon de la antaŭa vorto, v. G.P.
132. Apartaj formaĵoj
- Homojn-evitulo *ein Menschenscheuer*; roman-germanajn vortojn (Z.) *romanisch-germanische Wörter*.
133. Evitu tro longajn vortojn
- «En nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili estas ne kunigitaj, sed uzataj aparte.» (Z. Resp. 16).
134. Principo de neceso kaj sufiĉo
- D-ro de Saussure starigis tiun regulon, laŭ kiu oni enigu ĉiun vort-parton, kiu ŝajnas necesa por facila kompreno, sed forlasu ĉiun troan (kiel ankaŭ en la germana oni ofte nur diras, ekz-e, *Zug*, ĉar la kunteksto klarigas la specialan sencon, tamen oni en certaj okazoj devas esprimi la specon de tiu *Zug*, dirante *Eisenbahnzug*, *Charakterzug* ktp.; v. 142.
135. Mult-ebla vortfarado
- La kunigeblo de vortoj estas tre pli granda ol en la germana, kie oni ridetas pri vortoj korekte formitaj de infanoj, kiuj tamen ne estas kutimaj. Oni ridas pri ili, ĝis eble iu poeto sukcesas enirigi la formon en la vortaron de literaturo. En Esp-o ĉiuj vort-klasoj estas uzeblaj por vortfarado: 1. la radikoj

(*hom'*, *kat'*, *lok'*). 2) die selbständigen Wörter, die für sich keine Endung brauchen (*krom*, *pro*, *tiom*), 3) die Affixe, (s. unten), 4) die grammatischen Endungen, die auch als Wörter betrachtet werden (so dass *o* gleichbedeutend ist mit «Substantiv», *e* mit «Adverb» usw.). Einziges Gesetz ist die Logik: Die gewollte Idee muss rein und klar gegeben sein.

136. Affixe (Anheftungen)

Sie zerfallen in Präfixe (Vorsetz-silben) und Suffixe (Nachsetz-silben).

137. Präfixe für Personen

bo- (aus dem französischen *beau-père*) = Schwieger-(vater, -bruder usw.); *bopatrino* Schwiegermutter; **ge-** (vom deutschen Ge = Mehrheit, in «Gefälle, Getöse», in Esperanto nur in der Bedeutung wie sie in dem Wort «Geschwister» liegt) = beiderlei Geschlecht enthaltend. Ursprünglich war diese Silbe nur für Personen gedacht, die auf gleicher Verwandtschafts-stufe in einer Familie stehen, bald aber wurde *gesinjoroj* nicht nur für Eheleute, sondern auch statt *sinjoroj kaj sinjorinoj* gebracht und von Dr. S. gebilligt. (Rev. I. 282).

138. Präfixe für Eigenschaften

eks- (vom lateinischen *ex* aus) = ausgedient, ehemalig: *eks-oficiro*; **fi-** (vom franz. *fi* pfui) = moralisch schlecht: *fihomo* Lump; **mal-** (franz., aber nicht wie in *mal* schlecht, sondern wie in *malheureux* unglücklich, Gegenteil von glücklich) = Gegensätzlich zu . . . : *mal-amo* Hass; **mis-**¹⁾ (deutsch: Miss-erfolg) = ungut, unrichtig: *misuxi* missbrauchen; **pra-** (lat. *prae*) vorzeitig: *pra-avo* Urgrossvater. Statt *pranepo* Urenkel, sage man *postnepo*.

139. Sonstige Präfixe

Dieselben werden hauptsächlich, wie im Deutschen, aus Präpositionen gebildet: **dis-** (lat.: aus-

¹⁾ Noch nicht in die Liste der offiziellen Wörter eingereiht, könnte auch entbehrt werden, da *fuŝ-* genügt.

(krab', plant', tru'); 2. la memstaraj vortoj, por si mem ne bezonantaj finaĵoj (ĉe, por, kie); 3. la afiksoj (v. sube); 4. la gramatikaj finaĵoj, kiuj estas ankaŭ vortoj memstaraj, tiel ke «o» signifas «substantivo», «e» = «adverbo» ktp. Sola leĝo estas logiko: La celata ideo devas esti esprimita nete kaj klare.

136. Afiksoj

Ili povas esti prefiksoj (antaŭ-metaĵoj) aŭ sufiksoj (postmetaĵoj).

137. Prefiksoj
por personoj

Bo- (el la franca *beau-frère*) = de edz(in)o: bo-nevo = nevo de la edz(in)o; **ge-** (el la germana en *Gebirge, Geplauder*) en Esp-o tiu sufikso ne rilatas aron, sed kunigon de ambaŭ seksoj, kiu estas entenata en *Geschwister, Gespielen, Gefreunde*: ge-edzoj = edzo kaj edzino. Unue tiu silabo estis destinata nur por personoj, starantaj en sama linio de parenceco en familio, sed baldaŭ oni uzis, ekz-e, «gesinjoroj» ne nur por ge-edzoj, sed anstataŭ «sinjoroj kaj sinjorinoj» kaj D-ro Z. tion aprobis (Rev. I, 282).

138. Prefiksoj
por ecoj

Eks- (el la latina *ex* el) = iama (pasinte), ne plu: eks-pastro = pensiita pastro; **fi-** (france *fi*, germane *pfui*) = abomena (laŭ moralo): fi-ulo = homo malica; **mal-** (franca, sed nur en la senco, kian ĝi havas en *malheureux*) = kontraŭa: mal-bona = tute kontraŭa al bona (pli ol nur ne-bona); **mis-**¹⁾ (germana: *Miswachs*) = ne bona, ne trafa: mis-kompreni = malĝuste kompreni; **pra-** (lat. *prae*) antaŭa: pra-tempo = antikva tempo. Anstataŭ «pranepo» oni prefere uzu «postnepo».

139. Ceteraj
prefiksoj

Ili estas precipe (kiel en la germana) formitaj el prepozicioj; **dis-** (lat.) = divers-flanken;

¹⁾ Ankoraŭ ne oficialigita, cetera «fuŝ-» sufiĉas por tiu ideo.

einander); **ek-** (viell. vom ital. *ecco* sieh!) für Beginnendes, Plötzliches: *ek-krii* aufschreien; **re-** (lat.: *re* wieder) = wieder, zurück; ¹⁾ **duon-** = nicht vollgültig, halb: *duon-frato* Halb-, Stiefbruder; **pli-, malpli-** (franz. *plus*) = mehr, weniger: *pli-grandigi* vergrössern, *malpli-vastigi* verengern usw.

140. Suffixe für Personen

-in (internat. für Weibliches) = Weib: *leonino* Löwin; **-id** (aus Herakliden, Napoleoniden usw.) = Abkömmling: *hom-ido* Menschenkind; **-ul** (lat. *ullus* irgend einer), im Deutschen «-er» oder «-ling»: *riĉ-ulo* Reicher, *junulo* Jüngling; **-an** (in Weimar-an-er, Darwinianer) = Zugehöriger: *urbano* Städter; **-ist** (internat.: Maschinist) = Mann für . . . : *bak-isto* Bäcker; **-estr** (ital. *ma-estro* Meister) = Vorsteher: *ŝip-estro* Kapitän; **-edz** (*edz-ino* von Prinz-essin, Z.) = Gatte: *lavistin-edzo* Mann der Wäscherin; **-ĉj** (?) Koseform für männliche Personen (die 2–5 ersten Buchstaben des Namens werden genommen): *Ka-ĉjo*, *Kar-ĉjo* Karl-chen; **-nj** Koseform für weibliche Namen: *Ma-njo*, *Mar-njo* Mariechen.

141. Suffixe für Sachen

-aj (franz. *-age*: *blamage*) = Sache, Etwas: *trink-aĵo* Getränk; wird auch für Fleischarten gebraucht: *bov-aĵo* Rindfleisch; **-il** (franz. *-il*: *outil*, *fusil*), (deutsch -el: Meisel, Schlegel usw.) = Werkzeug: *bor-ilo* Bohrer; **-ar** (lat. *aquarium*; Mobiliar) = Schar: *anaro* Anhängerschaft; bei manchen Wörtern hat das mit *-aro* gebildete Wort eine ganz bestimmte Bedeutung: *vagonaro* Eisenbahnzug (jetzt wird auch *trajno* benützt), für den andern Begriff muss in solchen Fällen *aro da vagonoj* gesagt werden; (Z. Rev. II, 436); **-er** (?) = Teilchen: *fajr-ero* (Feuer)funken, *sabl-ero* Sandkorn; **-uj** (franz. *etui*?) = Etwas, das . . . enthält 1) Behälter: *sup-ujo* Suppenschüssel; 2) Baum (auch

¹⁾ für „zurück“ wird oft auch *retro-* gebraucht, das nicht offiziell ist, und durch *return-* ersetzt werden kann, in Fällen wo *re-* nicht klar genug ist.

ek- (eble el la itala) = komenca, momenta: ek-stari = stariĝi; re-¹⁾ (lat.) = denove, returnen; duon- = ne plen-valora; unu el du egalaj partoj de iu tuto: duon-patro, duon-cirklo; pli-, malpli-: pli-vastigi ktp.

140. Sufiksoj
por per-
sonoj

-in (internacia) = persono aŭ besto apartenanta al la «malforta» sekso: virino = homo tiu-seksa; -id (greka) = naskito, posteulo: homido = naskito el homa gento; -ul (lat., en la germana ofte estas uzate finaĵoj -er, -ling) = persono: malkuraĝ-ulo; -an (lat.) = kiu apartenas al . . . : esperantano = adepto de Esp-o; -ist (internacia) = kiu profesie sin okupas pri . . . : ŝu-isto = kiu faras ŝuojn; -estr (ital.) = ĉefo: regiment-estro; -edz (*Prinz-essin* instigis la kreon de tiu vorto) = viro laŭleĝa al virino: kuracist-edzino = ino de kuracisto; (kuracistino = ino kuracanta); -ĉj formas karesajn nomojn de viro: pa-ĉjo = patro amata; -nj por formi karesajn inajn nomojn: Hele-njo = kara Helena'.

141. Sufiksoj
por aĵoj

-aĵ (franca: *emball-age*) = io, afero: manĝaĵo; la vorto estas ankaŭ uzata por viando: ŝafaĵo; -il (franca -il, germ. -el) = instrumento: sĝ-ilo; -ar (lat. *herbarium*) = grupo, kolekto da: libr-aro = biblioteko; se oni nur parolas pri iu nombro de libroj, tiam oni uzas «aro da libroj»; vagonaro = trajno; «aro de (aŭ da) vagonoj ne estas trajne kunigita; -er (?) = elemento, el kiu konsistas tuto: neĝ-ero = unuopa floko de neĝo; sabl-ero = unuopa sablo-grajno; («ero» oni ne konfuzu kun tempo-kalkulo, jarkalkulo); -uj (franca *etui*?) = objekto, kiu enhavas . . . 1^e skatolaĵo, poto, ktp.: cigar-ujo = enhavilo por cigaroj; 2^e arbo;

¹⁾ Anstataŭ «re» en senco de «returnen» oni ofte uzas la ne oficialan «retro»; «return-» estus ankaŭ uzbla.

-*arbo*): *pom-ujo* Apfelbaum; 3) Land (auch -*lando*); *Rus-ujo* Russland; für 3) wird neuerdings vielfach -*i* benützt, (lat. -*ia*: *Italia*, *Germania*; -*ing* (?) Gegenstand, in den etwas teilweise eingesteckt wird: *cigar-ingo* Zigarrenspitze; -*ej* (deutsch: in Auskunftei, Schreinerei) = Ort für eine Tätigkeit: *fabrikejo* Fabrikgebäude; -*ism* (internat.) = Lehre, System, Theorie und ähnl.: *komun-ismo* (1914 offiziell angenommen).

142. Suffixe für Eigen- schaften

-*âc* (ital. *accio*, spr. *aô*) = äusserlich gering verächtlich: *fier-aôa* dummstolz; -*ec* (ital. -*exxa*, *grandexxa*) = eigenschaftlich: *bon-eca* gütig; -*eg* (?) = verstärkt, gesteigert: *bon-ega* ausgezeichnet; -*et* (ital. -*etto*: libretto) = verkleinert, abgeschwächt: *bel-eta* hübsch; -*em* (franz.: *aimer*) = geneigt: *risk-ema* waghalsig; -*ebi* (roman.: -*able*, -*ible*, *rentabel*) = möglich, -bar: *lern-ebli* lernbar; -*ind* (?), viell. in Zusammenhang mit dem lat. -*endus* was sein soll) = würdig, wert: *honor-inda* ehrenwert. Die drei letzten werden unnötigerweise oft noch mit -*ec* verbunden: *ebleco* usw., doch genügt *emo*, *eblo*, *indo*; s. 134.

143. Suffixe für Zeitwörter

-*ad* (franz.: -*ade*: *promenade*) = dauernd tun: *vixit-adi* regelmässig oder häufig besuchen; -*ig* (rein-ig-en, sätt-ig-en) = machen, lassen, verursachen: *difekt-igi* beschäd-ig-en; -*igi* ist weder *igi* . . . *anta*, noch *igi* . . . *ata*, sondern einfach *igi* . . . *i*, wo Unklarheit entstehen kann, setze man z. B. statt *manĝigi* *manĝantigi*, bezw. *manĝatigi* (Z. Rev. I, 376); -*îg* (?) = werden, in den Zustand von . . . kommen: *mal-jun-îgi* altern. Nach *îgi* kommt -*ata*, -*ita*, -*ota* nicht in Anwendung: *pur-îginto* ein Reingewordener, (*pur-îgito* ist unmöglich).

144. *igi*, *sin*, *îgi*

igi sin braucht man, wenn es sich um eine gewollte Tätigkeit handelt, *îgi* bei ungewollter; Dr. S. brauchte vielfach für «setzen Sie sich»

pir-ujo, ankaŭ pir-arbo; 3^e lando: Germanujo, ankaŭ German-lando; por tiu lasta oni nun jam ofte uzas la latinan formon: Germanio, Italio; **-ing** (?) = objekto, en kiun oni povas parte enŝovi ion, por ke ĝi estu tenata: kandel-ingo = objekto por teni kandelon; **-ej** (germ. kaj rusa: *Metzger-ei*) = kutima loko por iu faro: bier-farejo; **-ism-** (internacia) = doktrino, sistemo, teorio, k. s.: darvinismo; (ekzistas diversaj pseŭdosufiksaj vortoj; pacifismo, ktp.).

142. Sufiksoj por ecoj

-aĉ (itala) = materie malbona, malŝatiga: ĉeval-aĉo = mizera ĉevalo; vidu «fi-» 138; **-ec** (itala: *grand-ezza*) = kvalita: amik-eco; **-eg** (?) plifortigas signifon: mont-ego; **-et** (itala: *libretto*) mal-fortigas: mont-eto; **-em** (franca *aimer*) = inklina: leg-ema; **-ebl** (romana: *-able, ible: passable, possible*) = kio povas esti farata: plenum-ebla; **-ind** (? , eble el la latina: *-endus*, kio estu farata) = meritanta: konsil-inda. La tri lastaj ofte, superflue, estas en substantiva formo kunigataj kun **-ec** (laboremeco) sed tute sufiĉas: **-emo**, **-eblo**, **-indo**; v. 134.

143. Sufiksoj por verboj

-ad (franca: *-ade: canonade*) = fari ripete aŭ daŭre: promenadi; **-ig** (germ. *befehl-ig-en, ermut-ig-en*) = fari, lasi, kaŭzo: pur-igi, satigi; «igi kun verbo signifas nek 'igi -anta', nek 'igi -ata', sed nur 'igi -i', sekve ĝi povas tre bone esti uzata en senco aktiva kaj pasiva», (Z. Rev. I, 376). Kie povas okazi malklaro, tie oni aldonu antaŭ ĝi la participajn formojn **-ant** aŭ **-at**; **-iĝ** (?) = esti farata iu aŭ io: bon-iĝi = veni en staton, kiu estas bona. Post «iĝ» nur la aktiva participo 'estas ebla, ne la pasiva: edz-iĝinto (ne edziĝito).

144. Igi sin, iĝi

La unuan oni uzas, kiam temas pri io mem-volita, la duan por ne-volitaĵo. «Anstataŭ

sidigu, er gibt aber zu, dass *sidigu vin* oder *eksidu* logischer ist; (Rev. I, 188). Uebrigens genügt in vielen Fällen schon *sidu*, denn es handelt sich um das Sitzen selbst und nicht nur um das Sich-setzen.

145. -um

ist ein neutraler Suffix, der gebraucht werden kann, wenn für eine gewünschte Wort-erweiterung kein anderer Suffix taugt; immerhin hat sich die bisherige Entwicklung dahin entschieden, den Begriff von «um herum» damit zu verbinden: *aer-umi* lüften, *buton-umi* zuknöpfen usw.

146. Suffixe für Technik und Wissenschaft (noch nicht als offiziell anerkannt)

-*end* und -*ox* haben sich als nützlich erwiesen, und werden auch zuweilen in der Umgangssprache benützt. -**end** (lat. *-endus*) = was sein soll: *farenda* was getan werden soll. -**ox** (ital. *-oso*, franz. *-euse*, deutsch *por-ös*) = viel enthaltend von . . . : *ston-oxa* steinig; es soll nur für greifbare Dinge gebraucht werden, also nicht *kur-aĝoxa*; Weitere Suffixe (-*ix*, -*iv* usw.) wurden bestimmt abgelehnt, sie erschweren die Sprache und geben (namentlich -*ix*) zu vielen Unklarheiten Anlass. Für letzteres ist die beste Lösung: man nimmt die internationalen Wörter mit diesem Schein-suffix als Wurzelwörter auf.

Reg. 12. Wenn im Satz ein Wort kommt, das von selbst eine verneinende Bedeutung hat, so wird die Negation **ne** weggelassen; z. B.: *mi nenion vidis* ich habe nichts gesehen.

147. ne, mal-

Man achte auf die Unterschiede: *ne-bela* un-schön, *mal-bela* hässlich; *ne-utila* unnützlich, *mal-utila* schädlich.

148. jam ne,
ne plu

Für viele Fälle können beide Ausdrücke gleich gut angewendet werden, doch gibt es Fälle, wo (nur einer der Ausdrücke richtig ist, denn *ne plu* nicht mehr, fernerhin nicht) bezieht sich auf etwas vorher Bestehendes: *mi ne plu vixitos vin*

'sidiĝu' estus pli bone diri 'sidigu vin', aŭ 'eksidu'; tamen, ĉar la formo 'sidiĝu' jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam 'esperantismo' kaj nomi ĝin eraro, oni jam ne povas» (Z. Rev. I, 188). Cetere «sidu» ankaŭ sufiĉas.

145. -um

estas sufikso neŭtra (simile kiel prepozicio «je»), oni povas ĝin uzi, kiam ne estas taŭga sufikso por dezirata vort-nuanco; la ĝisnuna praktiko precizigis «um» en la sencon «ĉirkaŭ»: kol-um-o, man-um-o, mal-varmumi, serpentumi, rentumo, krucumi kip.

146. Sufiksoj
por tekniko
kaj scienco
(ne oficial-
igitaj)

-oz kaj -end pruvigis oportunaj, iafoje oni ilin uzas ankaŭ en la komuna lingvo; -oz (itala: -oso, franca: -euse, germ. *mysteri-ös*) = mult-enhava: por-oza; ĝi estu uzata nur en materia senco, do ne, ekz-e: bru-oza; -end (lat. -endus) = kio devas esti: skribenda (letero). Pliajn sufiksojn (-iv, -iz) la Akademio decide malakceptis: ili nur komplikigas la lingvon, kaj kaŭzas facile ne-klaraĵojn, precipe -iz, pri kiu plej bona solvo estas, uzi la internaciajn vortojn kun tiu pseŭdo-sufikso kiel radik-vortojn: elektrizi, magnetizi, ktp.

Reg. 12^a. Ĉe alia nea vorto «ne» estas forlasata. Ekz-e: mi nenion vidis *ich habe nichts gesehen*.

147. ne, mal-

Oni atentu la diferencon inter: ne-klara *unklar*, kaj mal-klara *verwirrt*; nebona *nicht gut*, *ungut*, malbona *schlecht*.

148. jam ne,
ne plu

En multaj okazoj ambaŭ esprimoj estas same bonaj, tamen iafoje nur unu el ili estas ĝusta: «Laŭ mia opinio 'jam' enhavas en si la ideon de ŝanĝo de stato; 'plu' enhavas la ideon de daŭrado. 'Jam ne' povas rilati ankaŭ al io, kio antaŭe ne ekzistis, sed estis

= früher besuchte ich dich ja, aber das kommt nimmer vor; *jam ne* (schon nicht) kann sich auch auf etwas beziehen, das vorher nicht vorhanden, sondern nur beabsichtigt war: wenn ich jemand besuchen wollte, dann aber meine Absicht änderte, so kann ich sagen *mi jam ne vixitos vin*. Im Deutschen kennt man diesen Unterschied nicht. *Ne jam*, das einen ganz andern Sinn hat, wird besser durch *ankoraŭ ne* gegeben; (Z. Rev. II, 96).

149. *ĉu ne?*
ĉu jes?

Beides heisst nicht wahr? das erste wende man an, wenn die vorhergehende Frage ohne Verneinung war, das zweite, wenn eine solche darin war: *ĉu vi konas lin? ĉu ne? ĉu vi ne konas lin? ĉu jes?*

150. Unschöne
Ausdrücke

ili estas sendube nekonataj de neniŭ esperantisto, besser: *ili certe estas konataj de ĉiu . . .*; *mi ne povis ne skribi*, besser *mi devis skribi*. Doch kann es auch Fälle geben, in denen zwei *ne* berechtigt sind: *ne nur ne malamiko, sed kunbatalanto li estis*.

151. Stellung
von *ne*

womöglich immer vor dem Wort, das verneint wird: *mi ne vidis lin*; *ne mi vidis lin (sed alia)*; *mi vidis ne lin (sed alian)*.

Reg. 13. Auf die Frage «wohin» nehmen die Wörter die Endung des Akkusativ an; z. B.: *tie da, tien* dahin.

152. Akkusativ
der Richtung

Al ist die Präposition der Richtung, da Präpositionen durch die Akkusativform ersetzt werden können, falls die Klarheit dadurch nicht leidet, so kann die Richtung jederzeit durch *-n* gegeben werden: *ekstere* ausserhalb, *ekstere*n nach aussen; s. 22, 104, 167. Die Präpositionen *antaŭ, en, mal-antaŭ, post, sub, super, sur, (tra), trans*, können sich auf einen Ort beziehen, an dem etwas sich befindet, oder auf einen Ort, zu dem man sich bewegt: ich gehe in der Stadt (*herum*)

nur intencata, aŭ esperata; 'ne plu' rilatas al io, kio ekzistis jam antaŭe. Ekz-e, se mi eĉ neniam vizitis vin, sed nur intencis tion fari, mi povas diri 'mi jam ne vizitos vin' (se mi ŝanĝis mian intencon), sed 'mi vin ne vizitos plu' mi povas diri nur en tia okazo, se mi jam antaŭe vizitadis vin.» — «Ne jam», kiu havas tute alian sencon, oni traduku per «ankoraŭ ne»; (Z. Rev. II, 96).

149. Ĉu ne,
ĉu jes

Ambaŭ signifas: ĉu (estas) vere, (kion mi diris)? La unuan oni povas uzi, kiam la antaŭa demando estas sen neo, la duan, kiam ĝi neon enhavas: ĉu vi tie estis? ĉu ne? ĉu vi ne tie estis? ĉu jes?

150. Ne-belaj
parolturnoj

«Ĝi certe estas ne-dezirata de neniu infano» pli klare kaj internacie estas: certe ĉiu infano deziras ĝin; «ĝi ne povis ne halti» pli bone: «ĝi devis halti». Tamen povas esti okazoj, en kiuj duobla neo estas prava: li ne nur estis ne helpanto, li eĉ estis perfidulo.

151. Loko de
«ne»

Kiel eble ĝi estu antaŭ la vorto neata: ne mi tion diris al li; mi ne tion diris, kaj ne al li (mi diris ion alian kaj al iu alia).

Reg. 13^a. Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo: Varsovion = al Varsovio.

152. Akuzativo
de direkto

«Al» estas la prepozicio de direkto, prepoziciojn oni povas anstataŭi per akuzativo, kiam la klareco ne estas tuŝata, tial oni ĉiam rajtas montri la direkton per «-n»: germanen traduki *ins Deutsche übersetzen*; v. 22, 104, 167. Kelkaj prepozicioj povas montri lokon, sur kiu oni estas, kaj ankaŭ lokon, al kiu oni sin movas: mi (ĉirkaŭ)iras en ĝardeno, mi (en) iras en ĝardenon. Por esprimi la movon al iu loko, oni uzas akuzativon, se

mi iras en la urbo; ich gehe in die Stadt (hinein)
mi iras en la urbon. Lässt man die Präposition *en* weg, so drückt der Akkusativ allein auch die Bewegung «hin zu» aus: *mi iras urbon*
 Statt des Akkusativs kann man auch *al* verwenden, das niemals nach sich den Akkusativ bekommt, weil ja in dieser Präposition schon der Sinn der Richtung liegt.

Reg. 14. Jede Präposition hat eine bestimmte, feste Bedeutung; ist es aber aus dem Sinne des Satzes nicht ersichtlich, welche Präposition anzuwenden ist, so wird die Präposition **je** gebraucht, welche keine selbständige Bedeutung hat z. B.: *ĝoji je tio* sich darüber freuen; *enuo je la patrujo* Sehnsucht nach dem Vaterlande usw. Die Klarheit leidet keineswegs darunter, da doch dasselbe in allen Sprachen geschieht, nämlich, dass man in solchen Fällen eine beliebige Präposition wählt, wenn sie nur einmal angenommen ist. In der internationalen Sprache wird in solchen Fällen immer nur die eine Präposition *je* angewendet. Statt *je* kann man auch den Akkusativ ohne Präposition gebrauchen, wo kein Doppelsinn zu befürchten ist; s. 152.

153. Ursache:
pro

wegen (für); «danken für» wird oft mit *danki por* gegeben, *pro* ist besser; s. a. 171.

154. Ziel,
Zweck: por

für, zugunsten von; bei *por* setzt der Deutsche leicht den Akkusativ nach, was ein Fehler ist! *por* mit Infinitiv, s. 117; *por ke* mit *-u*, s. 114.

155. Herkunft:
de, (el)

de = von, ist die am meisten gebrauchte Präposition: 1) nach dem Passiv, s. 83; 2) beim Genitiv, s. Reg. 2, 19; aber: «Besuch der Stadt H.» wird klarer gegeben durch *vixito al la urbo H.*; 3) um die Herkunft zu bezeichnen: *verko de Heine*, (oft auch *verko el H.*); 4) um den örtlichen Ausgangspunkt anzuzeigen (im Deutschen wird oft «aus, fort» oder «weg» nachgesetzt): ich ging vom Brunnen (weg) zu ihm; «Anblick des Pilatus vom Hotel (aus)». Obige Anwendungen

la prepozicio ne jam entenas la ideon de direkto; oni do diras: ĝis la domo, aŭ al la domo. Tamen, forlasante la prepozicion, oni povas meti akuzativon solan: mi iras gardenon, vojaĝas Frankfurton. «Personoj, por kiuj la akuzativo de direkto prezentas ian malfacilaĵon, povas sen ia peko kontraŭ la gramatiko uzi en tiaj okazoj la prepozicion 'al'.» (Z. Rev. II, 437).

Reg. 14^a. Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion «je», kiu memstaran signifon ne havas. (Per tio bona kompreno neniel estas malhelpata, ĉar io simila okazas en ĉiuj lingvoj, nome, ke en tiaj okazoj oni elektas iun ajn prepozicion, ĉefaĵo estas, ke ĝi estas uzata. En la internacia lingvo oni uzas por tiaj okazoj nur tiun unu-solan prepozicion). Anstataŭ la prepozicio «je» oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio, (kiam oni ne devas timi duoblan sencon); v. 152.

153. Kaŭzo: pro

«Danki pro» estas preferinde ol «danki por», kiu cetere ofte estas uzata; v. 171.

154. Celo: por

= favore al; tiu prepozicio ŝajnas precipe danĝera por germanoj, post ĝi ili facile uzas erare akuzativon. «Por» kun infinitivo v. 117; «por ke» kun -u v. 114.

155. Deveno:
de (el)

«De» estas la plej uzata prepozicio, oni ĝin bezonas 1^e post pasivo, v. 83; 2^e por genitivo, v. Reg. 2^a; 19. Sed kiam oni vizitas onklon, oni ne diru «vizito de onklo», oni diru «vizito al . . .»; 3^e por montri devenon: verko de Zamenhof' (ankaŭ uzata estas: el Zamenhof); 4^e por montri lokon de de-iro (laŭ germana kutimo oni povas uzi aldonan prepozicion: mi iris (for) de la puto al li; aspekto al Pilato de (el) la hotelo. La supraj

- entsprechen dem deutschen Gebrauch betr. «von»; anders ist's bei 5) um den zeitlichen Ausgangspunkt anzugeben: *de kvar tagoj* seit vier Tagen; hier wird aber vielfach *depost* gebraucht, doch wäre *de antaŭ* logischer.
156. Ausgang:
el, (de) *el* = aus, wird am besten (ausser im Fall 155,³) nur benützt, wenn es sich um ein örtliches «aus heraus» handelt: *el domo li venis*; *du el ili*; hiezu gehört auch die Anwendung bei Stoffen, aus denen etwas gemacht ist: *farita el oro*; «aus Mitleid» wird dagegen besser mit *pro kompato* gegeben; s. a. 34, 51, 69.
157. Richtung:
al, ĝis
(nicht ĉe) *al* = nach, (hin) zu, ist die eigentliche Richtungspräposition, es zeigt an und für sich nicht an, ob das Ziel wirklich erreicht wird; anders *ĝis*: *al la domo* dem Hause zu; *ĝis la domo* bis zum Hause. Franzosen brauchen zuweilen *ĉe* in der Bedeutung von *al*, was nicht zu empfehlen ist; s. 152.
158. Begleitung: kun
= (zusammen) mit: *kun mia amiko*, auch *kun danko*; aber *per martelo* s. 83.
159. Werkzeug:
per = durch, mittelst, (mit): *bati per bastono*; s. a. 83.
160. Stellvertretung:
anstataŭ = an Stelle von, (für); mit Infinitiv, s. 117; mit Akkus., s. 28.
161. Betreff: pri = betreffs, in Bezug auf, (über, an, auf usw.) nach Wörtern des Denkens, Redens und dergl.; s. a. 171.
162. Ausnahme und Einschluss:
krom, (kun) escepte *krom* = ausser, wird wie im Deutschen gebraucht, es drückt weder ein Ausnehmen, noch ein Einschliessen aus (es kann beides bedeuten), sondern nur ein Herausheben; befürchtet man Unklarheit, so brauche man *escept(int)e* oder *ne sole, sed ankaŭ*, oder auch nur *kaj ankaŭ*: *krom li ĉiuj venis (escepte li . . .)*; *krom li ankaŭ du aliaj ludis (li kaj ankaŭ . . .)* (Z. Rev. II, 436).

aplikoj estas konformaj al la uzo de l' germana *von*; sed plia uzo en Esp-o estas 5^e por montri tempan de-iron: de kvar tagoj. Sed en tiu kazo ofte oni uzas «depost», kvankam «de antaŭ» estas pli logika; v. 115.

156. Eliro: el,
(de)

«El» plej bone estas uzata (krom la kazo en 155, 3^e) nur, kiam temas pri loka eliĝo: el Italujo li venis; la plej granda el ili; similan signifon ni havas, parolante pri ŝtofo, el kiu io estas farata: teksita el lano. «Pro kompato» estas preferinda ol «el kompato»; v. 34, 51, 69.

157. Direkto:
al, ĝis
(ne: ĉe)

«Al» estas la esenca prepozicio por direkto, en si mem ĝi ne havas la ideon de celo atingita; alie estas pri «ĝis» kiu diras, ke celo (en spaco aŭ tempo) estas atingita. Francoj iafoje, laŭ sia uzo de *chez*, uzas «ĉe» en la senco de «al», kio ne estas rekomendinda; v. Reg. 2^a; 152.

158. Akompano:
kun

Kun mia amiko, kun ĝojo, sed per martelo! v. 83.

159. Ilo: per

Bati per bastono; per tiaj trompoj; v. 83.

160. Anstataŭo:
anstataŭ

= en loko de; kun infinitivo, v. 117; kun akuzativo, v. 28.

161. Rilato: pri

= rilate al, uzata tre ofte, post verboj kiel «pensi, diri, memori», ktp.: pretendi pri, ridi pri iu (priridi iun).

162. Escepto kaj
inkluzivo:
krom,
(kun), es-
cepte

«Krom» per si mem esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem.» Se oni timas konfuzon, tiam oni uzu «esceptinte» aŭ «ne sole... sed ankaŭ», aŭ eĉ nur «kaj ankaŭ»: ĉiuj ĉeestis krom Petro = Petro sola estis

- 163. Menge:**
da, po
- da = von, meist bei unbestimmten Mengen zu verwenden, hauptsächlich nach *iom*, *tiom* usw., *pli*, (*mal*)*pli*, (*mal*)*multe*: *donu al mi iom da pano*; meint man ein bestimmtes Brot, dann: *de la pano* (Z. Rev. I, 472), s. 42, 50, 100. *po* = je, das Stück zu, per Stück, wird am besten immer mit dem Nominativ gebraucht, Z. Resp. 21. Oft wird irrtümlicherweise *po* anstelle von *por* benutzt; s. a. 49.
- 164. multe da, multaj**
- Multaj homoj* = *diversaj homoj* (*ĉiu aparte*); *multe* (oder *multo*) *da homoj* = *granda nombro da homoj* (*kune*). *Multe da laboro* und *multa laboro* ist theoretisch gleich gut, auch *tiom da anoj* und *tiom anojn*; aber *tiom da anojn* ist ein Fehler, denn *anoj* ist von *da* abhängig; (Z. Resp. 28); betr. *tiom anojn* vergl. 22³.
- 165. Zeit: je**
(*antaŭ*,
dum, *post*)
- je* = am, um, in Zeitangaben: *je lundo*, *je (la) mateno*; (Z. braucht in solchem Fall wohl auch: *en la mateno*), s. 43, 44, 49, Reg. 14.
- 166. Nähe: ĉe,**
apud, *ĉirkaŭ*
- ĉe* = bei, sehr nahe, berührend, auch: im Hause von . . .; *apud* = (nahe) bei, an der Seite von . . ., neben, benachbart; *ĉirkaŭ* = um herum, in bezug auf Ort, Zeit und Menge; s. a. 157.
- 167. Präpositionen als Adverbien**
- Die meisten Präpositionen können durch Ansetzen von *e* Adverbien werden, und als solche durch Beifügen von *n* den Begriff der Richtung bekommen: *antaŭ* (vor), *antaŭe* (vornen), *antaŭen* (vorwärts, nach vorn); s. 116.
- 168. Infinitiv**
- nach Präpositionen, s. 117.
- 169. Doppelte Präposition**
- Vielfach werden Präpositionen als Präfixe verwendet, in solchen Fällen kann die Präposition (wie im Deutschen) wiederholt werden: aus einem Haus (heraus) gehen; er ging in das Haus (hinein); er tat es auf den Schrank (hinauf).

for; krom Petro ankaŭ Karlo ĉeestis = ambaŭ estis tie.

163. Kvanto:
da, po

«Da» ofte uzata, kiam oni parolas pri ne-definita kvanto, precipe post «iom, tiom», ktp. (mal)pli, (mal)multe. Se oni celas kvanton de konata, ĵus preparolita aĵo, tiam oni uzas «de»; donu al mi de la viando (kiu estas sur la tablo). «Po» (v. Reg. 4^a), plej bone oni ĉiam uzas post ĝi nominativon (Z. Resp. 21). Ofte oni erare uzas «po» anstataŭ «por»; v. 49.

164. Multe da,
multaj

«Multe da laboro» kaj «multa laboro» estas teorie same bonaj, ankaŭ «multo da laboro» estas ĝusta; tamen: vane estis multo de mia laboro ĉar: la kvanto aŭ amplekso de la laboro estas konata.

165. Tempo: je
(antaŭ,
dum, post)

«Je» estas la ĉefa prepozicio por tempo-indiko: je (la) mateno, je la deka (horo), je la dua de Marto; v. 43, 44, 49.

166. Proksimo:
ĉe, apud,
ĉirkaŭ

«Ĉe» = tre proksime, tuŝante, ankaŭ «en domo de»; «apud» = flanke, najbare de; «ĉirkaŭ» = ĉiuflanke, rilatas al loko, tempo kaj kvanto; v. 157.

167. Prepozicioj
kiel ad-
verboj

La plej multaj prepozicioj povas fariĝi adverboj per aldono de -e; estante adverboj ili povas ricevi la signifon de direkto per plia aldono de -n: ekster (*ausser*), ekstere (*aussen*), eksteren (*nach aussen*); v. 116.

168. Infinitivo

post prepozicioj v. 117.

169. Dufoja
prepozicio

Ofte oni uzas prepoziciojn prefikse, tiam oni povas (kiel en la germana) ripeti la prepozicion: (el)iri el domo; li eniris (en) la domon, li ĝin (sur)metis sur la ŝrankon.

Reg. 15. Sogenannte **Fremdwörter**, d. h. solche Wörter, welche die Mehrheit der Sprachen aus einer und derselben fremden Quelle entlehnt hat, werden in der internationalen Sprache unverändert gebraucht, indem sie nur die internationale Schreibung annehmen; aber bei verschiedenen Wörtern, die eine gemeinsame Wurzel haben, ist es besser, nur das Grundwort unverändert zu gebrauchen, die abgeleiteten Wörter aber, nach den Regeln der internationalen Sprache zu bilden; z. B. Theater = *teatro*; theatralisch = *teatra*.

170. -acio, -icio,
-ucio, -oro
usw.

